

HABIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO


REDAKTORO:
S-RO. MIGUEL GUTIERREZ ADURIZ

N.º 100
Maj-Jun. 1976

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª
Telefono 424 44 92 - BILBAO-5

100

etaĵ semoj



La 100-a N-o de HEJS-bulteno

Estas evidente, ke la ronda cifero 100 fariĝas celo tre dezirata en multaj el niaj aktivajoj. Atingi la centan numeron estas motivo de rememoro, analizo kaj perspektivo por la estonteco.

La 100-a N-o de HEJS-bulteno enhavas gravan signifon por nia landa movado. Ĝi esta spegulo de la agado, laboro, suferado kaj entuziasmo de la junularo, de niaj junaj geesperantistoj, kiuj pli frue aŭ malfrue portos la torĉon de nia movado.

La 100-a N-o de nia junulara bulteno reprezentas la laboron de minimume 17 jaroj, kaj 17 jaroj en kiu ajn kultura movado estas periodo grava. Tempo sufiĉa por ŝanĝoj, renovigoj kaj pri multaj aliaj cirkonstancoj, en kiuj la vivo de la movado povas elekti tiun aŭ alian vojon. Feliĉe, la bulteno de nia junularo ĉiam restis fidela al la principo de nia celo, tio estas, la disvastigo de Esperanto.

Proprasperte mi scias, ke cent numeroj reprezentas grandan laboron. Kiom da zorgoj por pretigi la originalojn. Kunlaboraĵoj promesitaj kiuj ne alvenas, kunlaboraĵoj kies redaktado ne taŭgas por publikigo. Korektado ĉe la presejo, kaj lastmomente, kiam la bulteno jam estas presita, konsternite oni rimarkas, ke je la fino de iu vorto mankas la terura litero "n"; aŭ ke sur aliaj literoj mankas la cirkunfleko, kio donas malan signifon al la frazo.

Ni ne forgesu la neŭtralecon. Jes, la redaktoro tre devas atenti neniun ofendi. Oni devas resti senpartia kaj ĉiun kontentigi. La redaktado de kiu ajn gazeto aŭ bulteno estas multe pli kompleksa ol eble pensas la legantoj. Tamen, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, la entuziasmo forlasas neniam la respondeculojn kaj la bultenoj unu post alia aperas senĉese. Guste pro tiu tasko ni devas gratuli nian junularon. Ĝia persisto kaj konstanta laborado estas esperiga juvelo por la estonteco de nia movado.

Miajn plej sincerajn gratulojn por la gvidantaro de nia junularo, kiu brave batalas, ofte en malbonaj kondiĉoj, por ke nia idealo fariĝu plena realaĵo. Ankaŭ dankon, ĉar ofte oni permesas al mi kunlabori en nia ŝatata HEJS-bulteno, kion mi ĉiam faras kun speciala plezuro.

Mi esperas, ke je la dekstra flanko de la hodiaŭ honorata 100 cifero, ne estos necese aldoni la numeron "0", ĉar tio signifus, ke la homaro ankoraŭ ne komprenis la mesaĝon de D-ro Zamenhof.

Luis Serrano Pérez

La estraro informas



Grupo de ĉeestantoj, al la II-a HEJS-tendaro, antaŭ la pordo de «La Colegiata» en Santillana del Mar

Santander estis la urbo kiu ĉijare gastigis la HEJS-tendaron (II-a). Certe la plej interesa kaj traktinda flanko de la arango, krom la HEJS-kunsido, estas sendube la etoso en kiu ĝi disvolviĝis, ĉar la firmiĝo de porjunulara esperanta kunveno en Hispanio, povus signifi grandan pason por HEJS kaj por la tuta movado en nia lando ĝenerale.

Sekve, en la venonta numero de nia revuo ni klopodos, laŭ eble, bildigi kaj komenti kion okazis dum la tri pluvemaj tagoj de ĉi lasta Paska Semajno. Tamen, nun, ni povas anticipi ke mirindaĵoj ne okazis, ke la organizado ne estis Zaragoza (tio estas kiel tiu de la unua HEJS-tendaro en Zaragoza), nek bona kiel ni esperas estos tiu de la venonta jaro (okazonta en Madrid), nek supera kiel tiu de la 4-a tendaro (okazonta en iu ajn punkto de nia lando). Eble kelkaj sin demandos kion vere ni volas diri per ĉi lastaj zigzagaj frazoj; nu, ke la II-a HEJS-tendaro estis plia simpla ŝtupo supren.

Do, ĉar interesaj kaj gravaj, la estraro prezentas nun la konkludojn de la HEJS-kunsido okazinta en la tendaro.

1.^a) Nuna situacio de HEJS:

- a) *Revuo.* — La respondeculo prezentis la situacion de la revuo kiel bonan, kaj petis pli da kunlaboro. Aliflanke la nunaj linio kaj sinteno estis deklaritaj de la ĉeestantoj kiel daŭrigindajn, atentigante pri la ne enpolitikiĝo de la HEJS-organo.
- b) *Delegitoj.* — Pri tiu ĉi punkto oni aprobis la jenon:
 - i) Disdoni materialon (laŭ la eblecoj kaj post mendo) inter la delegitoj por verbadaĵ celoj.
 - ii) Sendi la kalendarojn al la delegitoj por ke tiuj disdonu ilin (antaŭe la kalendaroj, kiel sciante, estis senditaj kun la revuo kaj ŝajne la plejmulto perdiĝis).
 - iii) Komisii al la delegitoj informi la estraron pri kiu(j) samurba(j) HEJS-ano(j) veturos al IJK, kun la celo trovi la plej konvenan anstataŭonton de nia prezidanto ĉe la komitatkunsidoj.
 - iiii) Komisii al la delegitoj fari realisman studon pri la “etoso” en siaj respektivaj urbaj por trovi homojn pretajn kunlabori kiel estraranoj (prezidanto, vicprezidanto, kasisto, sekretario, ktp) post la demisio de la tuta estraro nuna fine de ĉi jaro.

- c) *Eksteraj rilatoj.*—
- i) HEF.—Oni atentigis la estraron pri la neceso plistreĉigi niajn rilatojn kun HEF por pli racie agi en nia lando.
- ii) TEJO.—Laŭ la nuna respondeculo, la rilatoj inter TEJO kaj HEJS ekzistas nur je burokrata nivelo kaj ŝajne tiel daŭros ĉar montriĝas nenia perspektivo de ŝanĝo.
- ĉ) *Financa raporto.*—Laŭ la bilanco prezentita de la kasisto ĉio iris pli-malpli glate pasintjare dank'al sufiĉe bona profito atingita per la disvendado de loterio, tamen oni konstatas en la buĝeto, prezentita por la 77-a jaro, la ekziston de deficino.


2.^a) *Venontjara kotizo.*—Tial ke la enspezoj pro kotizoj ne kovras eĉ la koston de la revuo, oni prezentis tri proponojn, tiel voĉdonitaj:

Ptoj	—	—	—	—	—	—	—	—	voĉdonoj
150	—	—	—	—	—	—	—	—	1
175	—	—	—	—	—	—	—	—	1
200	—	—	—	—	—	—	—	—	11
—	(sindetenoj)	—	—	—	—	—	—	—	1

Konsekvence la venontjara kotizo estos ducent (200) pesetoj.

- 3.^a) *III-a HEJS-tendaro.*—Estis unuanime akceptita la propono por ke la Madrida E-Liceo aranĝu la trian tendaron de nia sekcio.
- 4.^a) *Propono por la honora membrigo de S-ro Salvador Aragay.*—Pri tiu ĉi punkto la tuta ĉeestantaro voĉdonis "Por", kaj tial nia fondinto, s-ro Salvador Aragay, estas de nun "Honora Membro de HEJS".
- 5.^a) *Pliaj sugestoj kaj proponoj.*—Ene de ĉi aldona punkto oni decidis trionigi de nun la profiton de ĉiu HEJS-tendaro, tiel ke unu parto iru en la kason de HEJS, alia iru en specialan kason destinita prepari la sekvontan tendaron, kaj la tria parto estu uzata, post voĉdonado, laŭ la cirkonstancoj. Ĉijare la tria parto (2200 ptoj) estos donacitaj al HEF por FALP (fondo de adquisición de un local en propiedad).

La estraro



Gajnintoj de la konkurso pri desegnoj.

HEJS: 2.^o Periodo

Kiel sciante, Salvador Aragay, post longega laborado en la starigo kaj funkciigo de HEJS, decidis definitive forlasi tiun agadon. Tiam, en la Kongreso de Mieres, junaj grupanoj el Bilbao, tie ĉeestantaj, pretis transpreni la gvidadon de la Sekcio.

En tiu epoko, troviĝis en la Bilbao'a Grupo sufiĉe vigla aro da gejunuloj, kvankam ne tre sperta lingve. La kongresintoj en Mieres alportis la proponon pri translokigo de la sidejo al Bilbao. Post komuna pritrakto de la afero, ili akceptis iluziplene la novan taskon.

Fakte, la tasko revivigi agoniantan organizaĵon ne estis facila, sed tio ne estis obstaklo por ili. Komence de 1971 jam aperis, sub la redakto de M.^a Carmen Navarro, la unua numero de "HEJS" el Bilbao. Ĝia enhavo estis, se ne interesa, jes distra. En ĝi oni ekskluzive uzis esperanton. Tamen, la artikoloj temis pri Bilbao'aj aferoj aŭ almenaŭ estis de tiaj aŭtoroj. Kialo ne estis neallaso de alilokuloj, sed simpla kaj bedaŭrinda izoleco.

Kompreneble, en tiaj cirkonstancoj, la tuta estraro, escepte de Salvador Aragay, administranto de la HEJS-restadejo de Monistrol, estis Bilbao'a.

Feliĉe, iom post iom, tiu ĉi situacio solviĝis. Danke al forta junulara partopreno en la nacia kongreso de Alicante, per niaj varbemaj tiamaj Prezidanto, José Fariñas, kaj Sekretariino, M.^a José Morán, multaj gejunuloj eksciis pri HEJS, kaj eniris la organizaĵon. Krome, kelkaj volontuloj pretis varbi por la Sekcio kaj prizorgi pagon de kotizoj en siaj urboj. Tiel ekestis la HEJS-delegitoj.

La kunlaboraĵoj en la revuo, kvankam jes ĉefe, ne jam estis ekskluzive el Bilbao. Dume, ĝia prezento malrapide, sed sen paŭzoj, altiĝis. Unue, oni ŝanĝis la kovrilajn paĝojn al la nuna formo, kun nova anagramo. Kelkajn monatojn poste, la internaj paĝoj havis grandan pliboniĝon. De tiam, per fotaj kliŝoj ili estas multobligataj, kio, krome, faciligas la redaktadon.

Plue, nova antaŭenpuŝo por la membronombro estis la nacia kongreso de Vigo, kiun multaj gejunuloj ĝoje partoprenis. Denove necesas mencii la per-

sistan varbemon de M.^a José Morán kaj José Fariñas.

Tamen, en neŝanĝebla procezo, tiu aro da gejunuloj, kiu entuziasme surprenis la taskon revivigi HEJS, pro diversaj kaŭzoj, ĉu pro laciĝo, ĉu pro aliaj novaj okupiĝoj, sen sufiĉa eniro de novaj fortoj, malaperadis. Mem la Prezidanto migris eksterlanden komence de 1972. Tamen, li povis ĉeesti la nacian kongreson de Vigo, kiel dirite, ege sukcesa, kaj tiun de Madrid, preskaŭ dezerta laŭ junulara vidpunkto. Restis dum tiu tempo kiel ĉefa respondeculo la Sekretariino, M.^a José Morán. Fine de 1973, ankaŭ ŝi formigris.

Se ĝis nun mi simple laŭdis, ĉar laŭdojn ĉefe meritis tiuj ĉi du gekuraĝuloj, permesu al mi kritiki ion: mankis respondeco pri korekta kaj rapida prizorgo de la korespondado, kiu kaŭzis konfuziĝojn, malordon. Sed ja ne ĉion oni povas peti al nur du homoj, kaj je la fino al unu!

En tiuj ĉi cirkonstancoj, mi eniris HEJS-estraron, kiel voĉdonanto, komence de 1973, ĉeestinte en Bilbao la esperantan kurson 71-72, gviditan de M.^a José Morán kaj José Fariñas.

Se simpla membro komence de 1972, mia partopreno en HEJS iĝis iom post iom pli granda, ĝis kiam en 1974 Sro Angel Figuerola, HEF-Prezidanto, min lokis en la prezida posteno.

Miaj antaŭuloj ricevis revivigotan mortinton. La ĵusnomita estraro kaj mi, danke al ilia laboro, havis antaŭ ni vivantan, kvankam ne tre viglan organizaĵon.

Ĉefa tasko, des pli grava pro la febleco de la Bilbao'a Grupo rilate junularon, estis disdoni respondecojn al alilokaj HEJS-anoj. Tial, la novan estraron eniris homoj el Santander, Barcelona, Vigo kaj Sabadell. Bedaŭrinde, ne ili ĉiuj aktivis por HEJS dum sia oficperiodo. Sed ĉefe unu el ili ludis gravan rolon por la internacia diskonigo de nia ekzisto: Juan Azcuénaga. Li, HEJS-ano jam de la fondiĝo, respondeplene korespondis kun la tiam TEJO-Sekretariino, tiel ke revigliĝis rilatoj kun la tutmonda organizaĵo.

Tia estis la kontaktado kaj la plenumo de ĉia ebla kunlaboro, ke en la 30.^a IJK en Münster la nombro de TEJO-komitatanaj membroj de HEJS

altiĝis de 1 al 4. Juan Azcuénaga plene eniris TEJO-n, ĉar de tiam li estas ĝia estrarano pri Regiona Agado.

Cetere, de la komenco de 1974, jam ĉiuj leteroj atingintaj nian sidejon havis koncernen respondon, tiel ke, de organiza vidpunkto, HEJS ĉesis esti silenta. Ĉiuj korespondaĵoj estis de tiam orde arkivataj.

Aliflanke, de financa vidpunkto, bona aŭguro estis la premio atingita en la jarfina loterio de 1973. Ĉar multaj kvitancoj ne aperis, nia kapitalo konsiderinde plialtiĝis, malgraŭ la defecito pro nealtingo de kotizoj kaj konstanta kresko de kostoj. Ĉi-jare, ankaŭ eble ni bonŝancos pro sama kaŭzo.

Jam fine de 1972 la redaktadon transprenis Itziar Arteche. Dum ŝia periodo, la revuo certe altiĝis sian kvaliton, kvankam, bedaŭrinde, ne multe altiĝis la nombro de kunlaborantoj, kaj la paĝnombro restis sensanĝa: 12. En la jarfina numero de 1973, blanka paĝo, reliefiganta la nulan partoprenon en konkurso de artikoloj, sukcesis vekti la atenton kaj altiris novan kunlaboron por ĝi.

Por fortigi la internan strukturon de la Sekcio, dum la kongreso de Madrid oni decidis okazigi HEJS-tendaron en majo 1974. Reago: nula. Sajnas, ke la datoj estis nekonvenaj.

La jaro 75 komenciĝis kun bonaj perspektivoj, almenaŭ rilate kunlaboron kun TEJO, kiun jam de post la IJK prizorgis Miguel Gutiérrez. Ne la samon mi povas diri pri HEF. La nula reago kiun niaj leteroj atingis ĉe ĝi elĉerpis mian diplomatan kapablon, kio konkretiĝis en pliaj pli acidaj leteroj miaflanke. Feliĉe, ĉar iam devis okazi, HEF reagis. Bedaŭrinde, ŝajnas tamen, ke por eviti tiajn malglataĵojn nuntempe konvenas minimumigi la kontaktojn.

Granda paŝo por kontroli la rilatojn HEF-HEJS kaj tiujn interne de HEJS estis la aprobo, fare de HEF-estraro, de la HEJS-Regularo. La demando pri ia leĝeca reguligo de HEJS stariĝis ĉefe kiam Johano Guñón, dum la 30.^a IJK, informis pri sia baldaŭa pretigo de projekto de Statuto por HEJS. Iom poste, li sendis ĝin al la sidejo. Ĉiuj estraranoj ricevis kopiojn. Leginte ĝin, Juan Azcuénaga, opiniante ke tia Statuto —kiu atribuis al HEJS juran personecon, kaj tial, sendependecon de HEF, kaj en la linio de TEJO-Statuto stariĝis demokratitan komitaton, kiu

elektu la estraron— ne estis konvena al la organizaĵo en la tiamaj enlandaj cirkonstancoj, pretiĝis tute alian projekton de Regularo, por interna uzo de HEF-HEJS. Ĝia nedemokrata karaktero, laŭ li, estis postulata de la reala situacio. Pliajn komentojn legu en n.^o 95, paĝoj 8-9. La estraro, ricevinte ambaŭ proponojn, unue elektis kiel bazan tekston tiun ĉi lastan, kaj, kun la aprobitaj modifoj, transdonis ĝin al HEF-estraro, kiu ĝin aprobis kun 1 amendo.

Komence de 1975, kelkaj ŝanĝoj estis en la konsisto de la estraro. Ĝi plu enhavis, krom plimulto da Bilbao'anoj, homojn el Santander, Barcelona kaj La Laguna. Ankaŭ ne ili ĉiuj aktivis.

Dum 1974, Itziar Arteche, pro aliaj okupiĝoj, iom post iom neglektis la redaktadon de "HEJS". En 1975, mi iĝis oficiale Redaktoro. La nombro de paĝoj de la ordinaraĵoj numeriĝis de 12 al 16, ne ĉefe pro mia verkemo, sed pro la granda kunlaboro kiun mi ricevis el Santander, kie 2 junaj homoj liveris al mi en ĉiu numero minimume 6 paĝojn pretajn por publikigo. Krome, la kvalito de la artikoloj estis konsiderinda, tiel ke komentoj, laŭdaj mencioj aŭ resumoj pri "HEJS" aperis en pluraj el la plej gravaj esperantaj bultenoj, tiel landaj kiel internaciaj. Oni povas aldoni la eldonon de eksterordinara numero "Hispana Kantareto", enhavanta esperantan tradukon de diversaj hispanlingvaj kanzonoj.

Internan fortiĝon signifis ankaŭ la okazigo de la I.^a HEJS-Tendaro en Zaragoza. Se ne sukcesa laŭ organiza vidpunkto, la partopreno de 55 gejunuloj estigis reciprokajn rilatojn de amikeco kaj kunlaboro.

La nombro de membroj, danke al la varbemo de kelkaj delegitoj, senpaŭze altiĝis.

Resume, eble oni povas katalogi 1975 kiel la ĝis nun plej sukcesan jaron en la 2.^a periodo.

Nova jaro, 1976, denove havis novan estraron. Krom en Bilbao, estas estraranoj en Sabadell, Barcelona, Madrid kaj Santander.

Fruas ankoraŭ por juĝi la rezultojn, sed ni faru kelkajn rimarkojn.

Mia jarkomenca soldatservo tute nuligas mian eblecon labori por HEJS. Tial, Miguel Gutiérrez, el Santander, kiu jam antaŭe mem redaktis plurajn paĝojn en 1975, estas la nuna Redak-

toro. Krom lia lingva sperteco, liaj konceptoj pri tio, kio devas esti nia revuo, estigis novan, facile rimarkeblan linion, kiu sendube plaĉas al la plimulto el la legantoj.

Ankaŭ kiel pasintjare, 2.^a HEJS-Tendaro okazis, ĉi foje en Santander. Certe, la antaŭaj mankoj preskaŭ tute solviĝis, pro kio organizo ĝi pli sukcesis. La nombro de ĉeestantoj ne estis tiel alta pro komprenebla kaŭzo: malcentra situo de la urbo rilate al la devenlokoj de la pasintjaraj tendumintoj.

La nuna numero estas ia kulmino de la HEJS-agado dum jam 16 jaroj. Mi devas publike danki ĉiujn kunlaborintojn, sen kies helpo vi ne povus legi tiun ĉi eksterordinaran numeron. Apartan mencion meritas Salvador Aragay, ĵus nomita honora membro en nia Tendaro, kiu, krom sia 11-jara laborado en niaj vicoj, forte subtenis tiun ĉi eldonon per malavara donaco. Necesas ankaŭ mencio de tiu, kiu surloke helpis la presadon de la nuna numero, Nu, koran dankon al ĉiuj.

Tamen, ne mielon mi povas lasi en via lango de leganto. Estas atentende, ke, kvankam de ekstera vidpunkto oni povas konsideri HEJS forta, la interna rigardo malkaŝas teruran feblecon.

La febleco troviĝas ĝuste en tio, ke ne ĉiuj membroj, sed nur manpleno da ili, estas kiuj per sia laboro subtenas la organizan strukturon. Des pli gravas, ke junaj homoj havas ofte novajn okupiĝojn, loĝlokojn kaj... ne ĉiam povos daŭre esti junaj. La renoviĝoj, en kelkaj okazoj, kiel, por ekzemplo, nun en la Bilbao'a Grupo, forestas. Tio implikas, ke, ĉar pri nacia organizaĵo temas, el la tuta lando devas veni kunlaboro, kvankam, kompreneble, pli grandaj estas la sidejaj taskoj.

La nuna situacio de la sidejo, ne kontentiga, postulos, do, miaopinie, baldaŭnan ŝanĝon. Ĉu estas homoj pretaj pluporti la torĉon? Mi esperas ke jes. Kontraŭe, povos esti, ke 16 jaroj da penado finiĝos en la nenion. HEJS ekzistu, ne longe, ĉar la fina venko de esperanto estas proksima!?


Ĝuste en la direkto de la venkigo de esperanto, grava, fundamenta paŝo ne estas ankoraŭ entreprenita de HEJS. Pro tiu bedaŭrinda malforteco, nia agado direktiĝis nur internen de la Movado. Esperanto ne estas sekteca ĵargono, sed celas esti ĉies dua lingvo. Kion ni faris ĝis nun por tio?

Miguel Angel Altuna

KIA
ESTONTECO
POR
H. E. J. S. ?

SPECIALA MODELO DE HOR-
LOĜO POR TIUJ, KIUJ NE VO-
LAS SCII KIOMA HORO ESTAS.

KONCERNAJ MONTRILOJ,
ELEKTEBLAJ SE NECESE.



Sufiĉe ofte la esperanto-movado emas atenti pri sia historio, pri la eventoj okazintaj en la pasinteco, eĉ sporadaj atingoj ŝajnas, post ne multaj jaroj, esti gloraj kaj epokfaraj triumfoj. Eble tial ne estas tiel kutima zorge prilabori la estontecon surbaze de objektiva analizo de la nuna stato de la koncerna movada organizo.

Lastatempe montriĝis H. E. J. S. kiel sekcio kiu staris verŝajne je sia

ĝisnuna kulmino, kvankam samtempe evidentiĝis grava interna krizo. En H. E. J. S. ne estis disputoj kaj tial neniu timas disigon de la sekcio; tamen, kunigo de pretaj laboremaj homoj aperis kiel nepra bezono por antaŭenpuŝi ĝin kaj apogi kaj helpi ĝian izolitan estraron.

Pluvivado neniel povas resti kiel plej ĉefa celo de HEJS-gvidantaro, sed ĉu oni povas alimaniere pensi kiam kunlaboro ne troveblas? Certe, funkciado de perjunulara organizo ne estas facila, ĉar kun la sperto oni atingas samtempe tiun aĝan limon kiu lin/ŝin forigas el la vicoj de la juneco.

Tial, verŝajne, mi devus demandi la prezidanton tiel pri la nuna H. E. J. S., kiel pri la alfrontota problemaro de nia sekcio. Tamen, pro lia militservado en la Kanariaj Insuloj, mi demandas ĝian vicprezidanton kaj nunan "HEJS"-redaktoron Miguel Gutiérrez Adúriz.

—La akceptita HEJS-regularo difinas la celon de nia sekcio. Ĉu vi povas klarigi por niaj legantoj kion vi —la estraro— faras por plenumi ĝin?

—Kiel sciante, ni celas plifortigi la interkompreniĝon kaj la amikecon inter la junularo, kaj por tion atingi nia regularo fiksas du punktojn: disvastigo kaj praktika utiligo de Esperanto.

Rilate la unuan punkton, ni devas konfesi ke ni preskaŭ nenion faras, ĉar niaj financaj rimedoj ne permesas aranĝi grandskalan kampanjon, kiel estas nia deziro, kaj, aliflanke, la kunlaboro kun Regiona Agado de T. E. J. O. estas tro mallarĝa. Eble ni povus ekspluati tiun ideon, tio estas regiona agado en Hispanio; ja, ni pensis multfoje pri tio, sed mankas kunlaborantoj.

Rilate la duan punkton, mi ne malkovras Amerikon se mi dirus ke ni eldonas dumonatan revuon en esperanto kaj dum la lastaj du jaroj ni aranĝis pli-malpli sukcesan tendaron. Tamen, la laboro de H. E. J. S. ne finas tie, ĉar ni iomete laboras helpante al la disvastigo de la lingvo en kastililingvaj landoj per sendado de inform- kaj lern-materialo, kaj en aliaj kampoj kiujn mi nun ne bone memoras.

—Inter la plej laŭdataj, almenaŭ lastatempe, agoj estas ĝuste la revuo, H.E.J.S.-organo, cetere redaktata de vi mem. Tamen, ĉu ĝia enhavo kontentigas vin? Kaj ĉu la ĝisnuna kunlaboro al via redakta tasko estas menciinda kaj plenigas viajn dezirojn?

—Nu, ŝajnas, laŭ la esploroj faritaj dum la II-a H.E.J.S.-tendaro en Santander, ke la nuna linio de la revuo plaĉas al la plejmulto de la H.E.J.S.-anaro, kaj tio estas ja bona. Mi ankaŭ opinias ke tiu linio estas sekvinda, sed aldonante pliajn bonajn artikolojn.

Pri la dua flanko de via demando oni mem povas konstati ke personoj vere menciindaj kunlaboras nun en nia revueto; tamen, tio ne tute plenigas miajn dezirojn, ĉar mi volus havi pli da gejunuloj inter la kunlaboremuloj.

—Ĉu estas ia alia agado kiun vi konsideras klariginda aŭ menciinda por niaj legantoj?

—Certe, nia agado estas tre limigita de la disponeblaj fortoj, tiel homaj kiel materialaj; sed ni povas menci la H.E.J.S.-tendaron kiel interesan aranĝon, kiu ŝajne enradikiĝos post la dua okazinta en Santander. Estus bone se tiu ĉi aranĝo enirus en la kalendaron de programoj organizitaj en Hispanio, ĉar, se oni plibonigas la tendarajn kondiĉojn kaj la programojn, la H.E.J.S.-tendaroj povus taŭgi kiel plifortikigilo de la sekcio kaj de la tuta hispana movado ĝenerale, kaj ni pensas ke tio estas ebla, sed por ĝin atingi oni bezonas pli da unueco inter la diversaj junularaj grupoj de nia lando.

—H. E. J. S., laŭ la dua artikolo de la "Regularo", apartenas al Hispana Esperanto-Federacio kiel ĝia junulara sekcio, sed, kiel disvolviga rilato kun la olda organizo?

—Inter H. E. F. kaj H. E. J. S. estas ĝis nun malmulte menciinda. Ni povas diri ke la oficiala organo de H. E. F., tio estas "Boletín", ĉiam estis je nia dis-

pono por publikigo de jarraportoj aŭ aliaj aferoj; tiusence, mi persone ricevis leteron de la nuna ĉefredaktoro de "Boletin" invitante nin daŭrigi kaj pliampleksigi tiun kunlaboron, se eble.

H. E. F. lasas nin agi tute libere, ne enmiksiĝante en niajn aferojn, kaj ni ĉiam respondis al tiu politiko, kiu ŝajnas al ni tre bona, per submetiĝo al nia ĉefa organizo, restante "bonaj infanoj"; tial ni prezentis al H. E. F. iun projekton de regularo, kiun H. E. F. aprobis kun nur unu eta amendo. Tamen, laŭ mia vidpunkto, ŝajnas al mi NEPRE necesa la partopreno de H. E. J. S., kiel sekcio kies graveco (243 membroj) estas nediskutebla, en la estraro de H. E. F. Tiu partopreno povus okazi, ekzemple, se la H. E. J. S.-prezidanto aŭ alia H. E. J. S.-komisiito havus ĉiam unu postenon kiel junulara respondeculo en la H. E. F.-estraro; kompreneble, tiu posteno havus la samajn rajtojn kiel la aliaj de la estraro.

—H. E. J. S. estas ankaŭ aliĝinta landa sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (T. E. J. O.) —vd. la trian artikolon de ĝia "Regularo". Kion vi opinias pri viaj rilatoj kun tiu asocio kaj kiel vi kunlaboras en la klopodoj de tiu tegmenta organizo?

—Denove mi volas esti sincera kaj konfesi ke niaj rilatoj kun la tutmonda junulara organizo (T. E. J. O.) estas preskaŭ nur burokrata afero, kaj certe pri tio ne kulpas ni, sed T. E. J. O. mem, eble pro miskompreno de ĝiaj gvidantoj rilate al la sinteno sekvinda kun la aliĝintaj sekcioj. Tamen, por ke oni ne kredu ke ni faras nenion, ni povas mencii nian etan helpon al la Regiona Agado de T. E. J. O. kaj nia kunlaboro kun certaj landaj sekcioj.

—Laŭ mia scio, nia prezidanto ekŝiĝos fine de la nuna jaro, kio signifas samtempan ĉeson de la tuta estraro. Nia "Regularo" klarigas ke "la prezidanto de la sekcio estas elektata de la estraro de Hispana Esperanto-Federacio (laŭ artikolo 7-a de H. E. F.) post sugesto de la ekŝiĝanta estraro kaj prezidanto". Ja, ni ŝatus ke li restos kiel prezidanto; tamen, li jam komisiis la estraron trovi sian posteŭlon. Kion vi opinias pri tiu afero? Ĉu vi jam trovis tiun homon, organizante taŭga kaj lingve kapabla por gvidi nian sekcion?

—Mi malkovras nenium misteron dirante ke H. E. J. S. estas malforta asocio kiu pretendas reprezenti la hispanan esperantan junularon. Ĝi jam estas 17-jaraĝa, kaj tio estas nekutima inter tiaspecaj organizaĵoj, kiuj preskaŭ ĉiam devas streĉi siajn fortojn celante nur pluan vivadon, ĉar la ega vera problemo de la junularaj esperantaj societoj kuŝas en tio, ke kiam juna esperantisto deziras kunlabori en la agada tereno de nia movado, do, tio signifas ke iom kaj iel regas la lingvon, pretas kunlabori, havas sufiĉan tempon, ktp., li multfoje jam ne estas tro juna; kaj se jes, la juneco forpasas fulme rapide kaj oni devas trovi la konvenajn anstataŭantojn en la sama urbo, se oni ne volas malmunti la tutan organizon, kaj se tio ne eblas, kaj en alia urbo troviĝas kuraĝuloj, ili devas preskaŭ komenci denove, lerni la samajn erarojn, kiujn oni faris antaŭe, suferi la samajn mankojn kaj sekve de ĉio ĉi la asocio kiu pretendas agi eĉ naciskale, neniam estas forta kaj malfacile povas atingi iun certan gradon de solideco kaj de vera, forta kaj fruktodona agado.

Ankaŭ H. E. J. S., malgraŭ sia bonstata ekstera aspekto, troviĝas ene de tiu diabla cirklo, kiun mi supre skize preparolis. Jes, la tuta estraro ĉesos esti valida je la fino de ĉi jaro, ĉar, kiel sciate, nia prezidanto jam de antaŭ longe esprimis sian deziron forlasi la postenon. Certe, ni dezirus ke li daŭrigu sian laboron almenaŭ unu plian jaron, sed estas li kiu devas diri la "lastan vorton".

La afero, do, estas klara: kiu gvidos la sekcion venontjare? Ĉu denove okazos forĵalo? Ni timas kaj bedaŭras tiun situacion, multe pli post vidi la lastajn atingojn de la sekcio, kiuj povus konduki ĝin en stato tre favora por vera sukcesa agado.

Ja, mi ne volas meti makuleton en nian jubilean revuon prezentante kvazaŭ mizeran estontecon por nia sekcio; tute ne! Neniam la situacio de H. E. J. S., almenaŭ laŭ miaj scioj, estis tiel bona. Kaj nia deziro estas daŭrigi, plifortiki kaj pliampleksigi se eble, nian karan 17-jaran bubeton.

H. E. J. S. ne estas nur la estraro, tamen, sen kapablaj kaj respondecaj gvidantoj, neniu asocio povas ne nur sukcesi, sed vivi. Tial, en la II-a H. E. J. S. tendaro, la estraro komisiis la delegitojn fari realisman studon en iliaj respektivaj regionoj por trovi la plej konvenan posteilon kaj lian eblan stabon. Do, ni esperu!

—Prezidanto bezonas apud li/ŝi grupon. Ĉu vi opinias ke ankoraŭ devos ekzisti la lastatempa linio de diktatoroj aŭ "ĉionpovaj agantoj", pro manko de aro da kompetentul(in)oj apud la prezidanto?

—*H. E. J. S. havas nun regularon, kiu ebligas, tiel al la estraro kiel al la membroj, disvolvigi la sekcion demokratie; tamen, mi opinias ke tiuj diktatoroj aŭ, kiel vi diras, "ĉion-agantoj", estas realaĵo naskita de specialaj nefavoraj cirkonstancoj, kiaj la manko de rimedoj, agadplano, kaj la plej grava: kunlaborantoj. Do, mi pensas ke la situacio ŝanĝos aŭ daŭros nur se ŝanĝas aŭ daŭras la cirkonstancoj kiuj ĝin kreis.*

—La laboro de la lastaj estraroj estas laŭdenda el kelkaj vidpunktoj. Ni mencias la sanajn financojn —malgraŭ la ne solvitaj problemoj—, kaj la prestiĝon kiun atingis la revuo. Bedaŭrinde, la kaŭzo ne estis teama laboro, sed peno de individuoj. Kio okazas nuntempe?

—*Nu, se mi diras ke, kiel ĉiam, la sekcio plu vivas dank' al la klopodoj de eta, tro eta, grupo, mi ne mensogas. Tamen, neniam antaŭe H. E. J. S. havis regularon, kaj kion oni povas esperi de asocio kiu ne estas regule organizita? Certe, malmulte, ĉu ne?*

Nun H. E. J. S. posedas internan regularon kaj uzante ĝin kiel bazon oni povas konstrui, kalkulante la fortojn kaj bezonojn, asocion kies eblecoj agi estus senlimaj.

—Antaŭ fini tiun ĉi intervjuon, mi deziras ke vi klarigu al ni, kiel vi antaŭvidas la estontecon de H. E. J. S., post la ekzisto de nia prezidanto, Miguel Angel Altuna?

H. E. J. S. povus fariĝi eĉ forta sekcio de H. E. F., post la ekzisto de nia nuna prezidanto, tio dependos de la nova estraro, se finfine oni trovas ĝin!

La dilemo estas en tio, ĉu estas junuloj kapablaj kaj respondecaj, pretaj plu teni la torĉon de la hispana esperanta junulara sekcio. Se tiel estas, mi fidus, se ne, kion diri?

Kiam tiu ĉi intervjuo finiĝas, mi pensas ke verŝajne kelkaj el vi opinios ke ne estas tro oportuna ĝia aperigo en nia jubilea numero, ĉar vi eventuale ne trovos ĝin sufiĉe optimisma, eĉ foje vi trovos ĝin pesimisma. Ĝenerale oni kutimas festi jubileon per brilaj vortoj, per gloraj rememoroj, per bombaj dankoj kaj gratulaj frazoj, kaj, tamen, ni elektis tiun ĉi vojon.

Laŭ longe de tiu ĉi intervjuo Miguel Gutiérrez analizas la plej diversajn agadojn kaj problemojn de nia sekcio, foje el estrara vidpunkto, foje el persona, strikte privata, opinio. Kvankam oni povas diri ke ambaŭ pensoj kunlandiĝas en unu sola vorto: Sincereco. Ja, li montras la estantecon kiun oni alfrontas, sed ĉiuokaze liaj respondoj lige al la estonteco de H. E. J. S. restos kiel valora peno por neniel atingi fantaziajn pintojn aŭ fali en senlumajn abismojn.

Ni esperu ke tiu homo, nepre necesa por daŭrigi la vojon "plu tenante la torĉon", aperu kune kun tia stabo kies kunlaboro ne nur pli solidigos la agadon, sed, eĉ plej grave, estos la garantio de nia estonteco.

E K S

KIO NOVA INTER LA JUGOSLAVA JUNULARO ?

Antaŭ kelkaj monatoj oni petis de mi ian artikolon por la jubilea numero de HEJS. La centa! Mi ekĝojis kaj havis kelkajn ideojn. Ne estas ofte jubileo inter la junularaj revuoj, ĉu? Mi devis prokrasti la verkadon al la sekvonta semajno... kaj intertempe pasis kelkaj monatoj: "oni" delikate atentigis min ke ne nur temp'esta'sed jam esti'.

Nun ne plu eblas demandi kion "oni" esperis de mi, ĉu ian seriozan artikolon kun bela tabelo kaj grafikaĵoj?, ĉu pompi pro sukcesetoj aŭ veadi pro rezignoj kiuj akumuligaŝ post eluzita entuziasmo?

De jugoslavino verŝajne oni volus aŭdi ian jugoslavan temon. Nu, ek: en Jugoslavio io okazas. Serioze, homoj, mi ne troigas! Kompreneble, tie ĉi jam antaŭe io okazadis. Cetera antaŭ multaj jaroj tie ĉi komencis la juna Lapenna. Tie ĉi ankaŭ Simo Milojević konatiĝis kun ita/ata afero. Kaj ne antaŭ longe Rada Gavrilović, gvidantino de KER ĝis la pasinta jaro.

Sed, mi parolu pri tiuj kiuj restis hejme kaj kiuj sur rabatite ricevitaĵ tabloj kaj strangmaniere hereditaj tajpiloj faras nun ion por Esperanto en Jugoslavio.

Kion vi scias pri la E-novaĵoj el Jugoslavio? Eble vi partoprenis la sarajevan IJK (internacia junulara kongreso), plendis pro troaj memmastrumadaĵ temoj, laŭdis bonan manĝaĵon dum la ekskurstago, aĉetis vian memoraĵon sur Baŝ-ĉarŝija kaj... malaperis. Ni restis. Kaj se vi tion ne sciis, mi diras al vi ke vi utilis al ni. Jes, ĉiu ĉeestinto. Jugoslavio havis sian verdan pedigreeon. Sed ĉe ni oni sciis utiligi la bruon kaj klimaton de la lastaj kongresoj.

Oni prave demandas sin: kio okazas post la kongreso en kongreslando. Lacegaj kaj elĉerpitaĵ LKK-anoj deziras nur ripozi kaj ĵuras ke dum sekvontaĵ monatoĵ... ili ja meritas ripozon. SED: de kongreso restas en ĉiu lando amaseto de gazeteltranĉaĵoj kaj kelkaj pene kolektitaĵ kursanoj.

Mi diras ke en Jugoslavio estas iom aliel. Ni opinias ke la ĉefa kondiĉo por antaŭenigo de Esperanto estas profesiigo de poresperanta laboro. Oni tion realigas ĉe ni: en Bosnio kaj Hercegovino kaj en Slovenio, sekretarioj de la E-ligoj estas profesiaĵ, kaj pagataĵ por sia laboro. En Kroatio ekzistas E-instituto, Internacia Kultura servo, en kiu por kaj per Esperanto laboras momente sep personoj. Sep, kiu financas tion? IKS mem: Esperanton en praktikon! Kiel? Tiel ke divertaĵ klientoj pagu ian bonan varon. Ĉu vendi la lingvon? Nur malmultaj pretas ion pagi por ĝi. Oni pagas la varon, enŝovu la lingvon en ĝin, oni aĉetos ĉion kune: IKS-stabanoj peras al jugoslavaj kulturkonsumentoj eksterlandajn teatraĵojn, ekzemple. IKS devis unue atentigi la konsumentojn ke ili "bezonas" pli da "internaciaĵ" porinfanaĵ prezentaĵoj por pli adekvata internacia eduko de infanoj. La financantaĵ kulturaj fondusoj konsentis pri la bona flanko de intenco kaj finance subtenas ĝin. Eksterlandan prezentaĵon oni simultane tradukas nacilingven. La financantoj ne demandas ĉu la prezentaĵo okazos en la hispana, la rumana aŭ la angla. Ĝi estu tradukata. Sed ĝi sur la scenejo okazas origine en Esperanto. En 1975 okazis 132 prezentaĵoj en la Internacia Lingvo. La pupteatristoj lernis Esperanton por povi montri sian arton ekster sialanda medio. Dum la lastaj 8 jaroj IKS sukcesis tiamaniere esperantigi 5 pupteatrojn...

La pupteatro estas nur ridinde eta kampo en la kultura vivo de unu lando. Ni scias. Ni konscias ankaŭ pri tio kiom da aliaĵ kampoj, ankaŭ ekster kulturo, ekzistas, en kiuj oni povus utiligi Esperanton. Ni faras ion ankoraŭ en turismo (ĉiusomere 50-o el niaĵ gelnantoj, dum eksterlandaj restadoj, ekzercas la lingvon), instruado (en la zagrebaĵ lernejoj oni fakultative lernas Esperanton), scienco (lingvistikaĵ simpozioj por neesperantistoj en kiuj eksterlandaj fakuloj

parolas la Internacian Lingvon), literaturo (prezenti minoritatajn valoraĵojn aŭ tiujn de etaj lingvoj al ekster jugoslava publiko)...

Niaj klopodoj restas donkiĥotaj se ni restas izolitaj. En la kampo de instruado kaj scienco io moviĝas en Hungario kaj Germanio. Se ĉiu lando havus sian Budapeŝton kaj sian Paderborn...

Cu oni jam ne devus savi Esperanton de esperantistoj-hobiistoj?

Nova helpokrio de freŝa entuziasmo? Ne nur. Mi volis nur diri kio estas nova ĉe ni: ni profesiigas. Kaj niaj rezultoj estus pli palpeblaj se Esperanto havus pli da profesie engaĝitaj homoj, pretaj kunlabori.

Nur tion, modeste, de mi. Kaj mi volonte scius ĉe la sekvonta jubileo de HEJS-bulteno ke mi ne eraris.

Do, HEJS, sanon!

Spomenka Stimec

UNU EL LA ŜTOPINDAJ TRUOJ

La lernado de lingvo bezonas tempon, tial devas ekzisti elementaj, daŭrigaj kaj superaj kursoj. Tamen ne ĉiu persono lernas la lingvon samcele; ni pensu pri tiu, kiu volas fariĝi instruisto de la koncerna lingvo, aŭ pri tiu, kiu nur deziras uzi ĝin por siaj eksterlandaj vojaĝoj, korespondado, ktp.

En niaj kluboj kaj societoj oni instruas esperanton ene de elementa nivelo. ĝenerale, kaj tre malofte oni aranĝas daŭrigajn kursojn. Tio kaŭzas ke la alproprigo de la lingvo far la lernantoj ne estas *kompleta*; ni diru ke laŭ A. J. Roche oni povus konsideri "scii lingvon" la jenon:

- a) Kompreni la parolan lingvon: konferencoj, konversacioj, ktp.
- b) Esprimi sin parole laŭ akceptebla maniero, tiel el la vidpunkto de la vortprovizo, kiel ili pli-malpli frue alprenos ĝin al si; kaj ankaŭ ni ne parolu pri kiaj devas esti la kursoj, ĉar bonega materialo pri tio oni povas ĉerpi el la libro "Metodiko de la Esperanto-instruado" far Rudolf Rakusa; sed ni iomete traesploru kio okazas, en nia lando, al lernanto ĵus fininta elementan kurson en E-klubo.
- c) Tralegi neteknikan libron aŭ artikolon, kiu ne enhavu specialajn malfacilaĵojn.
- ĉ) Kapabli redakti klare kaj kun rimarkinda senerareco.

El tiuj kvar "postuloj", oni povas konsideri "b" kiel la plej malfacilan. Certe en niaj E-kluboj kaj naciaj kongresoj oni trovas malmultegajn esperantajn papagojn kaj tro da krokodiloj. Do, ni ne parolu pri tiuj, kiuj interesiĝas pri la lingvo ĝisfunde, ĉar ili pli-malpli frue alprenos ĝin al si; kaj ankaŭ ni ne parolu pri kiaj devas esti la kursoj, ĉar bonega materialo pri tio oni povas ĉerpi el la libro "Metodiko de la Esperanto-instruado" far Rudolf Rakusa; sed ni iomete traesploru kio okazas, en nia lando, al lernanto ĵus fininta elementan kurson en E-klubo.

Du faktoroj estas tuj konstateblaj; unue, la kursfininto malmulte ekzercis la parolon per konversacioj, kaj due, lia vortprovizo estas malgranda; elimini ĉi tiujn du mankojn estas unu el la celoj de la daŭrigaj kursoj; tamen, tial ke tiaj kursoj ne abundas en la sfero de niaj E-kluboj, kaj ke foje la lernanto, pro diversaj kaŭzoj, ne povas daŭrigi la lernadon (manko de tempo, foresto el la urbo, ktp.); oni devus iel prepari la lernanton sin defendi en konversacioj per diversaj "armiloj" (rimedoj), por ke la jam diritaj mankoj ne senkuraĝigu lin. Kelkaj el tiuj "armiloj" oni povas liveri al la lernanto en la formo de tute pretaj frazoj, parolturnoj, specialaj esprimoj kaj proverboj, ("Li pafis sin for" anstataŭ "Li eliris kurante tre rapide" aŭ alia simila frazo; "Li mensogas ma-

ŝine" anstataŭ "Li estas granda mensoganto"; "Belaj rakontoj el trans la montoj" ktp.), kaj aliaj eĉ pli simplaj, sed ne tute profitataj kaj multfoje ne konataj de kelkaj "instruistoj", kiuj povas savi la novan kursfininton de elementa kurso el barakta situacio, tre simple, evitante al li troan mensostreĉiĝon, tordigitajn frazojn kiuj ne kontentigas la bezonojn de sin esprimado de la parolanto, la ĉiam riskan elirvojon kiu estas la uzado de la naciaj lingvoj kiam la parolanto troviĝas antaŭ embarasa situacio, kaj la plej danĝeran eblecon: la senluziigo.

Eble pro ĉio ĉi, oni de tempo al tempo aŭdas plendojn pro la manko de libro(j) (ja "Proverbaro esperanta" estas unu el tiuj libroj) kiu(j) liverus pretajn frazojn, parolturnojn, kaj esprimojn iel normigitaj aŭ sankciitaj de la komuna uzado. Certe tiaj rimedoj senrigidigus la konversaciojn de la novuloj kaj donus al ili sufiĉan kuraĝon por pli profundigi en la mirindaj eblecoj de la internacia lingvo.

Do, resume, jen bona motivo por tiuj, kiuj deziras agi por Esperanto, kompilante kiel eble plej bonan kaj taŭgan materialon, kaj samtempe bona motivo por ke la "Fundación Esperanto" uzu, per subvencio, sian monon.

TAO

ELTIRAĴOJ, PROPRAĴOJ KAJ ALIAJ ...AĴOJ

Fine de majo en la nacia biblioteko de Buenos Aires (Bona aero), estis inaŭrigita ekspozicion de altvaloraj specimenoj de la genia verko "Don Quijote". Inter la eldonaĵoj prezentitaj troviĝas ekde la unua presita, en Bruselo, ĝis la plej ĵusaj. Estas rimarkindaj tri volumoj apartenantaj al eldonoj de la dekdua jarcento, dekdu de la dektria, kaj aliaj pli aktualaj kun ilustraĵoj de Dali. Tamen la esperantistoj certe dezirus vidi, ne gravas ĉu kun aŭ sen Dali-aj ilustraĵoj, la esperantan eldonon de la mondfama libro de Miguel de Cervantes. Ĝis nun nur la unua ĉapitro, el la traduko de F. de Diego, estas eldonata, kaj ĝin oni povas legi en la dua numero de la revuo Horizonte. Tro malmulte, ĉar ni avidas la tuton!

—oOo—

La argentina ĵurnalo "La Nación" (la nacio) publikas en siaj paĝoj artikolon en kiu asertas, ke je la fino de ĉi jarcento estos en la mondo 400 milionoj da kastililingvaj parolantoj, krom 200 eblaj milionoj da dulingvaj usonanoj en kies lando la kastilia fariĝos helpa lingvo de kulturo (?).

—oOo—

Cele lerni kaj revivigi la vaskan kulturon, la profesiuloj de la regiono insiste petas la kreadon de vaska universitato, kiu esploru, transdonu kaj projektu ĝian identecon kiel popolon. En la unua etapo de tiu universitato, ĝi



okupiĝus pri la esplorado en la kampo de la historio, kulturo kaj lingvo vaskaj.

Por apogi tiun peton, pri vaska universitato, cirkulas en la tuta lando bela glumarko, kiun ni ĉi kune reproduktas.

—oOo—

La 23-an de aprilo aperis en Barcelona la unua postmilita ĵurnalo en la kataluna lingvo. La nomo de la gazeto estas "Avui". Ĝi atingis, per sia unua numero, la eldonkvanton de 150.000 ekzempleroj.

Miloj da personoj atendis ĉe la pordo de la redaktejo por aĉeti la novan ĵurnalon, kaj tial malmultaj ekzempleroj alvenis en la kioskojn, kaj ni scias ke eĉ al Venezuelo oni sendis certan nombron.

Estas atentinda la fakto ke la gazetoj estis la iloj kiuj helpis disvastigi la katalunan kulturon, ĉar en la paĝoj de ĵurnaloj kaj revuoj kiaj "La veu Cataluna", "L' instant", "La publicitat", "El Mati", ktp, aperis la plej bonaj pri-laborajoj de la elstaraj katalunaj verkistoj.

—oOo—

Tuj post ricevi la novaĵon pri la apero de "Avui" en katalunio, jen ni sciigas ke same oni preparas la aperon de ĉiutaga gazeto en la vaska lando, kaj de revuo, kies nomo estos "Teima", en Galegio.

Jes, la prilingva afero marŝas en nia lando; tiel, grupo da galegaj profesiuloj ĵus formis la Galegan Societon de publikigaĵoj, kies prezidanto estas la kuracisto kaj verkisto sinjoro Garcia Badell, kiu proklamas inter aliaj aferoj: "Ni volas ke Teima estu valora reprezentanto de la tuta galega kulturo", "Ni esperas eldoni la unuan numeron komence de ĉi aŭtuno", "Unue la revuo estos duonmonata, kaj la eldonkvanto 10.000 ekzempleroj", "Teima estos la unua paŝo por la establado de aŭtonomia galega gazetaro", "Ni fidas la baldaŭan aperon de la unua ĵurnalo skribita en nia lingvo".

—oOo—

La monda federacio de la sciencaj laboristoj (MFSL) unuigas 33 naciajn asociojn el 29 landoj kun pli ol 300.000 membroj kaj kun multaj membroj korespondantoj en aliaj 28 landoj. Ĝi estas fondita en 1946 laŭ iniciato de la Nobel-premiitoj: profesoroj Frédéric Joliot-Curie kaj Paul Langevin el Francio, John Bernal kaj Cecil Powell el Britio.

La oficialaj lingvoj en kiuj la federacio aperigas sian presorganon kaj siajn dokumentojn, estas kvar: angla, franca, germana kaj rusa. Tamen en sia lasta kunsido la Plenuma Konsilo de la Federacio decidis adopti Esperanton kiel kvinan lingvon por sia presorganon.

La jara abonkotizo de la esperanta eldono de "Scienca mondo" estas unu (1) usona dolaro. Tiun ĉi, ridinde malalta, prezon ebligis la subvencio de la Bulgara Asocio de la Sciencistoj, kies prezidanto aktive favoras Esperanton. Verŝajne UEA peros abonojn al la revuo (el esperanto).

—oOo—

La frazo "La esperanta junularo kolera kontraŭ Sandra" aperis kun grandaj literoj en la haga gazeto "Het Binnenhof" la 10-an de aprilo de 1976.

En Hago (Den Haag) la trian de aprilo okazis la eŭrovizia kantfestivalo, kaj rimarkebla estas ke preskaŭ ĉiuj la gekantistoj uzis la anglan lingvon anstataŭ la sia propra.

Kelkaj junaj nederlandaj esperantistoj atentigis la homojn pri tiu ĉi afero pere de 1000 flugfolioj, disdonitaj ĉe la enirejo de la kongresa domo kie okazis la evento, kun la jena teksto:

"La nederlanda kontribuo al la internacia kantfestivalo en la angla lingvo, estas nek nacia, nek internacia, sed esprimo de angla-usona kultursuperregado".

Tiun ĉi tekston oni tradukis en 12 lingvojn: nederlanda, franca, germana, hispana, greka, serbokroata, finna, norvega, portugala, angla, novhebrea, kaj itala. Tiuj ĉi lingvoj estas parolataj de la partoprenintaj kantistoj.

Multaj eksterlandaj gastoj, inter ili ankaŭ ĵurnalistoj, kun ĝojo rigardis kaj tralegis la flugfolion, kiun ili ja povis legi en sia propra lingvo. Ankaŭ oni atentigis multajn nederlandajn gazetojn, kaj "Het Binnenhof" aldonis men: "Por kantfestival-prezentistino, kiel ekzemple Corry Brokken, estus facila se Esperanto iĝus la ĝenerala komunikadlingvo, tiam ŝi ne plu bezonus balbuti en la angla kaj franca lingvoj".

Ni devas klarigi ke Sandra estis la nederlanda reprezentantino en la ĉijara eŭrovizia kantfestivalo, kaj ke la pasintan jaron la svedoj ankaŭ protestis kontraŭ la forta angla-usona influo. Ĉu la protestoj aŭdiĝos same en 1977?

—oOo—

La regantoj de Maroko ĵus disponis la aplikadon de drastaj rimedoj por ke, ekde la venonta lernojar, en la teritorio kiu estis la hispana Saharo, estu instruataj kun deviga karaktero nur la lingvoj araba kaj franca. Tamen, ankorau povos utiligi la kastilian, la malmultaj lernantoj(!?) de la lastaj kursoj de EGB (ĝenerala baza edukado).

Ni scias ke laŭ la interkonsento subskribita en Madrid, kiam hispanio (ĝiaj regantoj) transdonis la suverenecon super la teritorio al Maroko kaj Maŭrio, la instruado de la kastilia lingvo estus daŭrigata. Tamen nun, la marokaj aŭtoritatoj deklaras ke, pri la malplenumado de tiu dispozicio kulpas la hispana regantaro, ĉar ankoraŭ oni ne organizis oficiale la hispanan kulturen komision antaŭviditan en la interkonsento de Madrid. Do, se la hispana lingvo ne estas plu instruata, tio okazas ĉar la afero ne interesas al la hispanaj aŭtoritatoj (!?).

—oOo—

Dank' al interesa iniciato de Heroldo, tiuj, kiuj interesigas pri sciencaj demandoj, povas peti unu ekzempleron de la ĵus aperinta Scienca Suplemento de Heroldo n-ro 7/76, kiu prilumas temojn pri lingvistiko kaj etnologio. Notinda estas la eseo de Prof. M. Duc-Goninaz (universitato de Aic-en-Provence, francio), kaj la artikoloj de R. Lloancy (Tunizio) kaj G. H. Sutton (Svedio).

La interesigantoj povas sin turni al la jena adreso: "Heroldo de Esperanto, rue de la Reinette 13/bte 28, B-1000 Bruselo (Belgio).

—oOo—


En la kadro de la Jardeko de Batalo Kontraŭ Rasismo kaj Rasa Diskriminacio, kiun en 1973 proklamis Unuiĝinta Naciaro (U.N.), Jugoslavia Esperanto-Ligo organizas internacian seminarion "Lingvo kaj Rasismo", en Sarajevo de la 12-a ĝis la 16-a de aŭgusto 1976.

La aŭspicianto de la seminario estas la Jugoslavia Nacia Komisiono por Kunlaboro kun UNESKO. La partoprenantoj de la seminario estos sciencistoj, reprezentantoj de internaciaj organizoj kaj de adekvataj naciaj institucioj, kaj ankaŭ, private, interesitaj personoj (kiel aŭskultantoj).

La ĉefa temo de la seminario "Lingvo kaj Rasismo" estos pritraktita en kvin sekcioj: a) ĝeneralaj esploroj kaj studoj pri lingvo kaj rasismo sur internacia, regiona, landa kaj loka niveloj. b) problemoj de lingvaj minoritatoj kaj de ilia socia kaj kultura integriĝo sen perdo de la propra rasa, nacia kaj etna identecoj. c) sociaj, juraj, edukaj kaj kulturaj aspektoj de la rilato lingvo kaj rasismo. ĉ) problemoj de fremdaj laboristoj pro lingvaj baroj. d) rolo de la internacia lingvo kiel komunikilo inter la malsamaj lingvaj komunajoj kaj kiel adekvata instrumento por pli efika internacia batalo kontraŭ ĉiuj formoj de rasismo kaj rasa diskriminacio.

La aliĝkotizo estas 12 dolaroj, kaj la adreso: V. Pelagica 8/1 / 71000 Sarajevo / Jugoslavo.

EL LA FABELOJ DE SAMANIEGO



Kiam iu tago ni ricevis leteron de Amalia Núñez Dubús, al kiu antaŭe ni petis ian kunlaboron, nin kaptis ega ĝojo. Certe ni ne sciis ke ŝi estas malsana kaj troviĝas en hospitalo —ni deziras al ŝi kiel eble plej baldaŭan resaniĝon—, sed la letero, skribita per tremantaj manoj, montras la deziron de nia kara Amalia Núñez Dubús kunlabori en nia jubilea numero; tio estas ĝis tia grado ke ŝi sendis al ni fabelon de Samaniego, kiun, ni konjektas, ŝi konis parkere, kio ebligis al ŝi skribi ĝin en sia hospitala lito.

Pri Félix María de Samaniego (1745-1801), ni povas diri ke li naskiĝis en Laguardia (Alava), studis en la universitato de Valladolid, kaj tre interesiĝis pri francaj aferoj. Leginte "La Enciklopedion" kaj Volteraĵajn verkojn, li iĝis malreligiema. Interesaj verkoj de Samaniego estas: "Fábulas morales", "Carta literaria al señor Masson", "Coplas para tocarse el violín a guisa de tonadilla", "Los huevos moles", "Memorias de Cosme y Damián", "Parto de los montes", ktp.

Hundo kaj krokodilo

(Fabelo)

Trinkante hundo en Nilo,
li ja samtempe kuradis;
kvieste trinku, admonadis
la sagaca krokodilo.
Kurtrinki estas malsana,
diris hundo kun prudento;
sed, ĉu estas eble pli sana
ke vi piku min per dento?



JACK LONDON

PERDITA

VIZAĜO

JACK LONDON naskiĝis en Oakland (Kalifornio) en 1876, filo de ĉasisto. 'Ĉiam vagabonda, ebria de post mia 17-a jaro', laŭ sia propra konfeso, li vagas tra la nord-polusaj regionoj, tra Japanio, precipe tra Kanado; partoprenas en la legenda orfeburo ĉe Klondike, poste revenas al sia migra vivo de vilaĝo al vilaĝo, de lando al lando, de karceroj al karceroj pro vagabondado. Li mortis 40-jara, en 1916, verkinte grandan nombron da aventur-romanoj.

Jack London reagis kontraŭ la tiel nomataj 'dekadencaj verkistoj' de la fino de la pasinta jarcento, dirante:

"La hodiaŭa homo estas la sama, kiu trinkis akvon el la kranio de sia malamikoj ĉe la fundo de la germanaj arbaroj, rab-atakis la vilaĝojn kaj forprenis la virinojn de la najbaraj triboj, laŭ la maniero de la aborigenoj."

Influata de la teorioj de Nietzsche, Darwin kaj Huxley, li prikantas en siaj verkoj "la leĝon de la plej forta" kaj simbolas iaman Amerikan primitivan kaj bataleman; mem aventuristo, li similas al siaj protagonistoj, kiuj vivas sub la libera ĉielo, migras tra la vastoj kaj sentas sovaĝan amon al la naturo.

—oO—

Estis la fino. Direktante sin, kiel alhejma kolombo, al la ĉefurboj de Eŭropo, Subienkow iris longan vojon

da kruelo kaj hororo, kaj ĉi tie, en la rusa Ameriko, pli diste de lia celo ol iam ajn, la vojo finiĝis. Li sidis en la neĝo kun la brakoj kunligitaj sur la dorso kaj, atendente sian torturon, li fiksis la rigardon sur la egan kozakon, kiu kuŝis surbruste en la neĝo kaj ĝemis de doloro. La viroj ĵus finis brutali al li kaj cedis lin al la virinoj. La agoniaj krioj de la viktimo atestis, ke ili superis la demonecon de la viroj.

Subienkow plu rigardis kaj ekstremitis. Li ne timis la morton. Li jam riskis sian vivon tro longe sur la terura vojo de Varsovio ĝis Nulato por senti timon ĉe sia simpla forpaso. Sed li ribelis en sia interno kontraŭ la torturon. Ĝi ofendis lian spiriton. Kaj siavice tian ofenditecon kaŭzis, ne la penso, ke li devos suferi doloron, sed tio, ke la doloro povos igi lin protagonisto de trita spektaklo. Li sciis, ke li preĝus, kaj plorus, kaj petegus, kiel ĵus faris la granda Ivan kaj la aliaj. Kaj tio ne estus bela afero. Perei brave kaj elegante, kun unu rideto kaj kelkaj vortoj humuraj... ha, tia morto decus. Sed perdi la sinregon, senti la animon renversita de la tortura sufero de la karno, ŝriki kaj kriaĉi kiel simio, turniĝi en veran beston... ha, en tio kuŝis la plej terura.

Ne ekzistis la ŝanco eskapi. De la komenco mem, kiam li revis la luman revon pri sendependa Polujo, li fariĝis

pupo en la manoj de la Fato. Jam de la komenco, en Varsovio kaj Sankta Petersburgo, en la minoj de Siberio, en Kamĉatko, en la kadukaj ŝipoj de la felo-rabistoj, la Fato gvidis lin al ĉi fino. Sendube, kiam la mondo kreigis, oni stampis ĉi finon por li... por li, poeto kaj artisto, tiel delikata kaj sentiva, kun nervoj en konstanta vibro. Antaŭ ol oni pensis doni al li la ekziston, oni jam dekretis, ke la trema fasko da sentiveco, kiu konsistigis lin, estu kondamnita vivi en kruda kaj sinistra savaĝo kaj morti en ĉi fora regiono de tenebroj, en ĉi senluma loko, trans la lastaj limoj de la mondo.

Li suspiris. Tiel do, tio antaŭ li estis la granda Ivan... Ivan la giganto, la viro sen nervoj, la viro fera, la kozako fariĝinta kaperisto de la maroj, flegma kiel bovo, kun nervo-sistemo tiel primitiva, ke, kio egalas al doloro en la ordinaraj homoj, tion li sentis apenaŭ kiel tiklon. Mirinde, kiel ĉi indianoj nulatoj sciis trovi la nervoj de la granda Ivan kaj gvidi sin per ili ĝis la radikoj de lia trema animo. Kaj tion ili faris nesupereble. Oni apenaŭ povus kredi, ke viro kapablas tiel multe suferi kaj plu vivi. La granda Ivan pagis pro sia rudimenta nervaro. Li jam daŭris almenaŭ duoble ol la aliaj.

Subienkow komprenis, ke li ne povos elteni multe pli longe la suferon de la kozako. Kial Ivan ne mortis ankoraŭ? Li frenezigis, se la krioj de la giganto ne ĉesos. Sed, kiam ili ĉesos, tiam venos lia vico. Kaj Yakaga atendis lin kaj anticipu rikanis al li... la sama Yakaga, kiun, ĝuste en la lasta semajno, li piedbate eljetis el la fuorto, kaj kies vizaĝo ricevis la mordon de la rimeno de lia hundo-vipo. Yakaga sin okupos je li. Sendube Yakaga rezervis por li pli rafinitan torturon, pli efikan nervopiston. Ha, ion vere teruran oni faras nun al la kozako, se juĝi lian manieron ŝriki. La indianinoj, klinitaj super li, retropaŝis ridante kaj plaŭdante per la manoj. Subienkow vidis kian hororaĵon ili plenumis, kaj li komencis histerie ridi. La indianoj rigardis lin, mirante je lia rido. Sed Subienkow ne povis ĉesi.

Car lia rido neniam haltus, li klopodis regi sin, kaj iom post iom moderfĝis liaj spasmoj. Li strebis pensi pri aliaj aferoj kaj komencis retrolegi sian propran vivon. Li memoris pri siaj gepatroj, sia eta poneo, sia franca gover-

nisto, kiu instruis lin danci kaj kaŝe transdonis al li oldan, tre uzitan verkon de Voltaire. En sia imago defilis denove Parizo, kaj la norma Londono, kaj la gaja Vieno, kaj Romo. Kaj li vidis ankoraŭfoje la ardan grupon de junuloj revii, same kiel li, pri sendependa Polujo kun pola reĝo en la trono de Varsovio. Tie komenciĝis la longa vojo. Nu, li supervivis ilin ĉiujn. Tiel bravaj junuloj, kun siaj diversaj paseoj, revenis en lian menson unu post alia, komencante per la paro ekzekutita en Sankta Petersburgo. Ie vokto mortobatis unu; tie, sur la sanga vojo de la ekzilitoj, kie ili marŝis dum senfinaj monatoj batataj kaj mistraktataj de siaj kozakaj gardistoj, alia falis por ĉiam. Senescepte regis barbareco, besta kaj brutala barbareco. Ili mortis de febro, en la minoj, sub la skurĝo... La du lastaj, fuĝinte, pereis en batalo kontraŭ la kozakoj, kaj nur li atingis Kamĉatkon, post ol li rabis la dokumentojn kaj la monon de vojaĝanto, kies kadavron li forlasis en la neĝo.

Cio estis nura sovaĝo. Laŭlonge de la jaroj, dum li sopiris al mondumo, al atelieroj, al teatroj, lin sieĝadis la sovaĝo. Lian vivon li konservis je la kosto de sango. Ĉiuj murdis. Li murdis la vojaĝanton por preni de li la pasporton. Li pruvis sian kuraĝon duellante kontraŭ du rusaj oficiroj en la sama tago. Li devis provi sin mem por esti akceptita inter la felo-rabistoj. Li nepre devis tion fari. Malantaŭ li kuŝis la vojo, mil jarojn longa, tra la tuta Siberio kaj Rusujo. Neeble eskapi sur tia vojo. La sola eblo de savo troviĝis antaŭe, tra la glacia kaj nigra maro Beringa, ĝis Alasko. La vojo kondukis de sovaĝo al pli profunda sovaĝo. Sur la felo-rabistaj ŝipoj plagataj de skorbuto kaj batataj de la senĉesaj ŝtormoj de tia tempesta maro, la viroj, sen provizoj kaj akvo, turniĝis en bestojn. Trifoje li forvelis de Kamĉatko orienten. Kaj trifoje, eltenante ĉian misfortunon kaj suferon, la supervivantoj revenis al Kamĉatko. Ne ekzistis do ia eblo eskapi, kaj li ne povis reiri sur la vojo de alveno, ĉar lin atendis la minoj kaj la knuto.

Denove li forvelis orienten la kvaran kaj lastan fojon. Li partoprenis en la unua elŝipiĝo sur la legendajn Fok-insulojn, sed ne akompanis siajn kunulojn returne al Kamĉatko por disipi en frenezaj orgioj la monon el la feloj. Li ĵuris antaŭe neniam reveni sur la sama

vojo. Li sciis, ke, por atingi la karajn urbojn de Eŭropo, li devas ĉiam antaŭeniri. Tiel do li ŝanĝis ŝipojn kaj restis en la nova, obskura lando. Liaj kamaradoj estis slavaj ĉasistoj, aventuremaj rusoj, mongolaj, tataraj kaj siberiaj aborigenoj: kaj inter la sovaĝuloj de la Nova Mondo ili faris al si sangan vojon, masakris nombrojn da vilaĝoj, kiuj rifuzis pagi la fel-tributojn. Kaj ilin, siavice, buĉis la ŝipanoj. Li kaj unu finno estis la solaj supervivantoj el tia grupo, trapasis vintron de izolo kaj malsato en dezerta, Aleuta insulo, kaj ilia savo fare de alia felkomerca ŝipo en la printempo estis ŝanca okazo inter mil.

Sed ĉiam la terura barbareco sieĝis lin. Pasante de ŝipo al ŝipo kaj rifuzante iri returne, li fine atingis ŝipon navigontan al la sudo. Laŭlonge de la Alasko bordo, ili renkontis nur bandojn da sovaĝuloj. Ĉiu ankroĵeto inter la ĝibaj insuletoj aŭ ĉe la imponaj klifoj de la firma tero signifis aŭ batalon aŭ ŝtormon. Jen blovis tempesto detru-minaca, jen aperis batal-kanotoj plenaj de hurlaj indigenoj kun survizaĝa milit-ŝminko baldaŭ lernontaj siakoste la sangan povon de la pulvo de la maraj vagistoj. Suden ili navigis laŭlonge de la bordo, suden, cele al la mita lando de Kalifornio, tra regionoj, kie laŭdire troviĝis hispanaj aventuristoj, kiuj de Meksikio trabatis sin supren per batalado. Tiam li pensis kun ioma espero pri ĉi hispanoj. Se li transfuĝus al ili, ĉio alia estus facila: en unu aŭ du jaroj (ne gravis pli aŭ malpli da tempo) li atingus Meksikion, poste enŝipiĝus kaj baldaŭ Eŭropo estus lia. Sed eĉ ne unu hispanon ili renkontis. Nur la sama remparo da nealirebla sovaĝo staris ĉiam antaŭ ili. La loĝantoj de ĉi plej fora regiono de la mondo, milit-ŝminkitaj, pelis ilin for de la strandoj. Fine la sovaĝuloj izolis unu boaton, buĉis ties okupantojn, kaj tiam la kapitano decidis ŝanĝi direkton kaj velis returne al la nordo.

Pasis la jaroj. Li servis sub Tebenkoff, en la tempo kiam oni konstruis la reduton Miĉaelovski. Li vivis du jarojn en la regiono de Kuskokwim. En du sinsekvaj someroj, en la monato junio, li atingis la markolon de Kotzebue, kie la triboj kunvenis por interŝanĝi siajn produktojn; tie troveblis makul-punktitaj cervo-feloj el Siberio, eburo el la insuloj Diomedes, rosmaraj feloj el la strandoj de la Arkta Maro,

strangaj ŝton-lampoj (kies devenon oni ne konis), kiuj pasis per komercado de tribo al tribo, kaj foje ĉas-tranĉilo kun angla fabrik-marko. Subienkow sciis, ke tia loko konvenas por lernado de geografio: ĉar li renkontiĝis tie kun eskimoj el la markolo Norton, el la insuloj King kaj St. Lawrence, el la kabo Prince Of Wales, el la promontoro Barrow... Tiaj lokoj havis aliajn nomojn, kaj ties distancojn oni mezuris per tagoj.

Ĉi kolportaj sovaĝuloj venis de vasta regiono kaj per sinsekva komercado, iliaj ŝtonaj lampoj kaj ŝtalaj tranĉiloj venis eĉ de pli diste. Subienkow brutalis, kajolis kaj subaĉetis: oni alkondukis al li ĉian vojaĝanton el foraj spacoj kaj ĉian strangan tribanon, kaj en iliaj deklaroj ĉiam aperis mencioj pri danĝeroj nekredablaj kaj neklarigeblaj, kaj ankaŭ pri sovaĝaj bestoj, batalemaj triboj, densaj arbaroj kaj imponaj montoĉenoj; sed neniam mankis aludoj al preterhorizontaj homoj blankahaŭtaj, blu-okulaj kaj blondaharaj, kiuj bataliŝ kiel demonoj kaj nur serĉadis felojn. Ili loĝis oriente, tre fore, tre diste en la oriento. Neniu vidis ilin, nur la famo pri ilia ekzisto disvastiĝis.

Temis pri rigora lernado. Oni ne bone povis instruiĝi pri geografio pere de strangaj dialektoj kaj per informoj el konfuzaj mensoj, kie miksiĝis faktoj kun fantazio, kaj kie la distancoj mezuriĝis per "dormoj", kiuj variis laŭ la malfacilo de la irado. Sed fine atingis lin kuraĝiga onidiro: en oriento fluus granda rivero ĉe kies bordoj troviĝis la blu-okulaj viroj. La rivero nomiĝis Yukon. Sude de la reduto Miĉaelovski, alia granda rivero, nomata de la rusoj Kvikipak, enverŝiĝis en la maron. Laŭ la onidiro, ĉi du riveroj estis, fakte, nur unu.

Subienkow reiris al Miĉaelovski. Dum unu jaro li urĝis esplori kontraŭ-flue la riveron Kvikipak. Tiam Malakov, la rusa mestizo, metis sin ĉe la kapo de infera bandaĉo de miksrasaj aventuristoj, sovaĝa kaj feroĉa, kia neniam antaŭe venis de Kamĉatko. Subienkow estis lia leŭtenanto. Ili serpentis tra la labirinta regiono de la granda delto de Kvikipak, pene ascendis sur la unuaj montoj de la norda bordo, kaj, laŭlonge de kvincent mejloj, en felaj kanotoj ŝarĝitaj ĝisrande per komercaĵoj kaj municio, kontraŭbatalis la kvinnodan flulon de rivero larĝa de du ĝis dek mejloj kaj profunda je multaj

klaftoj. Malakov decidis konstrui la fuorton ĉe Nulato. Subienkow ne volis halti, sed baldaŭ akceptis la ideon resti tie: la longa vintro proksimiĝis kaj konvenus atendi. Li pensis, ke frue en la venonta somero, kiam la glacio degelos, li malaperos sur la rivero Kvikipak supren kaj trarobos sin ĝis la postenoj de la Hudson's Bay Company. Malakov neniam aŭdis la onidiron, ke Kvikipak estas la rivero Yukon, kaj Subienkow ne komunikis al li tian informon.

Poste okazis la konstruado de la fuorto. Oni ĝin faris per deviga laboro. La palisaroj el trunkoj leviĝis inter ĝemoj kaj vektroj de la indianoj nula-toj¹. La skurĝo batis ilian dorson, kaj la batojn ellasis la fera mano de la marodistoj de la maro. Kelkaj indianoj fuĝis, sed estis kaptitaj, kondukitaj returne kaj sternitaj antaŭ la fuorto; tie ili kaj ilia tribo lernis la efikon de la knuto: du mortis sub ĝi; aliaj suferis dumvivan kriplon, la ceteraj bone parkeris la lecionon, kaj ne okazis novaj fuĝoj. La neĝo komencis fali antaŭ ol oni ĝisfine konstruis la fuorton, kaj tiam venis la sezono de la feloj. Oni postulis de la tribo pezan tributon. Batoj kaj skurĝadoj ne ĉesis kaj, por ke la tributo oni pagu, la virinoj kaj la infanoj estis retenitaj kiel ostaĝoj kaj traktataj kun tia brutaleco, kian nur la fel-rabistoj kapablis.

Nu, oni semis sangon, kaj venis la tempo rikolti. La fuorto jam ne ekzistis: ĉe la lumo de ĝia incendio oni kruele buĉis la duonon de la fel-rabistoj. La alia duono pereis sub la torturo. Nur Subienkow restis; aŭ Subienkow kaj la granda Ivan, se tion ĝeman kaj vean en la neĝo oni povus nomi la granda Ivan. Subienkow kaptis la grimacon de Yakaga al li kaj komprenis lian sintenon. Spuro de la knuto vidiĝis ankoraŭ sur lia vizaĝo. Ĉion konsiderante, Subienkow ne povus lin riproĉi, tamen ne plaĉis al li imagi kion Yakaga farus al li. Li ekhavis la ideon apelacii al la tribestro Makamuk, sed sobre pensis, ke tia apelacio tute vanus. Tiam li pensis ankaŭ krakrompi sian ligilon kaj morti luktante. Tia fino venus rapide. Sed la ligaj rimenoj el rangifera ledo estis pli fortaj ol li. Ĉiam planante, Subienkow ekhavis alian ideon. Li faris signon al Makamuk kaj petis, ke ajna scianto de la marborda dialekto helpu per sia interpretado.

—Ho Makamuk— li diris. —Mi ne havas la intencon morti. Mi estas fama

viro, kaj estus stulte, se mi pereus. Vere, mi ne mortos. Mi ne similas al ĉi aliaj putraĵoj.

Li rigardis la vean, sangan ĉifonon, kiu iam estis la granda Ivan, kaj disdegne ekpuŝis lin per la pied-pinto.

—Mi havas tro da saĝo por morti. Atentu, mi posedas senegalan medicinon². Nur mi konas ĝin. Tial, ke mi ne mortos, mi cedos al vi la medicinon interŝanĝe.

—Pri kiu medicino temas? —demandis Makamuk.

—Pri vere stranga medicino.

Subienkow ŝajnis heziti momenton, kvazaŭ li abomenus dividi kun li la sekreton.

—Nu, mi diros al vi— li daŭrigis. —Iom el ĉi medicino, frotita sur la haŭton, igas ĝin dura kiel roko, dura kiel fero, tiel, ke neniam tranĉa armo povas ĝin fendi. La plej forta hako faras al ĝi nenion. Tranĉilo el ostoj turniĝas en iom similan al peco da koto. Kaj la eĝoj de la feraj tranĉiloj, kiajn ni alportis al vi, perdas sian akron tuŝante la medicinon sur la haŭto. Kion vi donos al mi por la sekreto de ĉi medicino?

—Vian vivon— respondis Makamuk per la interpretanto.

Subienkow ridis disdegne.

—Kaj mi tenos vin ĉe mi kiel sklavon ĝis vi mortos.

La polo ridis eĉ pli disdegne.

—Oni deligu al mi la manojn kaj piedojn, kaj ni parolu— li diris.

La ĉefo faris signon; kaj, kiam oni lin deligis, Subienkow rulfaris cigaredon kaj fajris ĝin.

—Stulta babilo— diris Makamuk. —Tia medicino ne ekzistas. Ne eblas. Tranĉa eĝo havas pli da forto ol ajna medicino.

La ĉefo, kvankam nekredema, hezitis. Li jam vidis tro da inferaj magiaĵoj vere efikaj ĉe la fel-rabistoj. Lia skeptikeco ne estis do tre firma.

—Mi donos al vi vian vivon. Kaj vi ne servos kiel sklavo— li promesis.

—Mi volas ion plian.

Subienkow ludis sian ludon kun mirinda flegmo, kvazaŭ li marĉandus la felon de vulpo.

—Temas pri granda medicino. Ĝi savis mian vivon multe da fojoj. Mi volas unu sledon kun ties hundoj, kaj ses el

vijaj ĉasistoj, ke ili akompanu min sur la rivero malsupren kaj lasu min sekura je unu taga dormo de la reduto Miĉaelovski.

—Vi devas loĝi ĉi tie kaj instrui al mi ĉiun el vijaj inferaj magiaĵoj.

Subienkow levetis la ŝultrojn kaj silentis. Li elblovis fumon de la cigaredo en la frostan aeron kaj scivole turnis la rigardon al tio, kio restis el la granda kozako.

—Tiu cikatro! —subite diris Makamuk, montrante la kolon de la polo, kie livida marko rivclis ŝirvundon de tranĉilo ricevitan en ia kvadrato en Kamĉatko. —La medicino ne estas bona. La tranĉo eĝo pli fortis ol la medicino.

—Tre forta viro ellasis la baton —respondis Subienkow. Poste iom meditis kaj aldonis: —Pli forta ol vi, pli ol via plej forta ĉasisto, pli forta ol li.

Kaj per la pinto de sia mokaseno li denove tuŝetis la kozakon (jam senkonscian kaj protagoniston de horra spektaklo) al kies dismembrigita korpo alkruciĝis ankoraŭ la torturata vivo, kvazaŭ spite.

—Kaj krome la medicino estis ne bona, ĉar en la regiono, kie mi ricevis la vundon, ne troveblas beroj de certa speco, tre abundaj en ĉi lando, kiel mi povis vidi. Ĉi tie la medicino tre efikas.

—Mi permesos vin iri la riveron malsupren —diris Makamuk. —Kaj vi havos la sledon, la hundojn kaj ankaŭ la ses ĉasistojn, ke vi sentu vin pli sekura.

—Vi tro lantis decidi —respondis Subienkow kun aplombo. —Vi ofendis mian medicinon, kiam vi ne tuj akceptis miajn kondiĉojn. Aŭskultu: nun mi petos ion plian: mi volas cent fokoselojn [Makamuk rikanis]; mi volas cent funtojn da sekaj fiŝoj [Makamuk kapjesis, ĉar fiŝoj estis abundaj kaj ĉipaj]; mi volas du sledojn, unu por mi, kaj la alia por miaj feloj kaj fiŝoj. Kaj oni devas redoni al mi mian fusilon. Se vi ne konsentas la preczon, ĝi altiĝos post ne longe.

Yakaga suffloris al la ĉefo.

—Sed, kiel mi povos scii, ke via medicino estas vera medicino? —demandis Makamuk.

—Tre facile. Unue mi iros en la arbaron...

Yakaga denove flustris al Makamuk, kaj ĉi lasta esprimis per kelkaj vortoj sian nefidemon.

—Nu, dudek ĉasistoj gardu min, se vi volas —daŭrigis Subienkow. —Okazas, ke mi devas kolekti la berojn kaj radikojn necesajn por fari la medicinon. Poste, kiam vi disponigos la du sledojn kun ties foko-feloj kaj fiŝoj kaj kun la fusilo, kaj kiam vi decidis pri tio, kiuj ses ĉasistoj akompanos min, nu, tiam mi ŝmiris la medicinon sur mian kolon kaj metos ĝin sur la tiean trunkon, por ke via plej forta ĉasisto prenlu la hakilon kaj donu tri batojn al mi sur la kolon. Vi mem povos haki la tri fojojn.

Makamuk staris kun gapa mieno, sorbante ĉi parolojn pri la lasta kaj plej mirinda magiaĵo de la fel-rabistoj.

—Sed —haste aldonis la polo— inter hako kaj hako mi ŝmiros al mi freŝan medicinon. La hakilo estas tre peza kaj akra, kaj mi ne volas fari eraron.

—Kion vi petis, tion vi ricevos —diris Makamuk en ĉio-konsenta impulso. —Jam komencu fari vian medicinon.

—Vi tro lantis decidi. Mia medicino ofendiĝis. Por forigi la ofendon, vi devas doni al mi vian filinon.

Li montris ŝin, knabinon turpan, kun straba okulo kaj lupeca dento elstara. Makamuk furioziĝis, sed la polo, sen perdi la aplombon, rulfaris kaj fajris alian cigarecon.

—Tuj decidu —li minacis. —Se vi ne rapidos, mi petos ankoraŭ ion plian.

En la sekvanta silento, la terura nordlanda sceno svenis el liaj okuloj kaj li vidis denove sian naskolandon, kaj Francujon, kaj foje, kiam li ĵetis rigardon al la lupodenta knabino, li memoris alian knabinon danc-kantistinon, kiun li konis, kiam li vizitis Parizon por la unua fojo en sia juna aĝo.

—Por kio vi volas la knabinon? —demandis Makamuk.

—Por ke ŝi akompanu min sur la rivero —respondis Subienkow, ĵetante sur ŝin taksan rigardon. —Ŝi fariĝos bona edzino, kaj boparenciĝi al vi estos honoro inda je mia medicino.

Li memoris ankoraŭfoje la danc-kantistinon kaj laŭte zumis kanzonon, kiun ŝi instruis al li. Li revivis la oldan vivon, sed en maniero iel sen rilata, nepersona, rigardante en sia memoro bildojn el sia propra ekzisto, kvazaŭ ili apartenus al la vivo-libro de alia ajn homo. La voĉo de la ĉefo rompis abrupte la silenton kaj alarmetis la polon.

—Konsentite —diris Makamuk. —La knabino iros kun vi sur la rivero. Sed sciu, mi mem hakos trifoje vian kolon.

—Sed inter hako kaj hako mi ŝmiras la medicinon —respondis Subienkow, montrante malbone kaŝitan zorgon.

—Nu, vi uzos la medicinon inter la hakoj. Jen la ĉasistoj irontaj kun vi, ke vi ne fuĝu. Iru al la arbaro kaj kolektu vian medicinon.

Makamuk fine konvinkigis pri la valoro de la medicino kaŭze de la avideco de la polo. Sendube nur la plej granda medicino povus puŝi viron jam ĉe la rando de la morto diskuti kaj marĉandi kiel oldulino.

—Krome —flustris Yakaga, post ol la polo malaperis kun sia eskorto inter la piceoj— kiam vi lernos fari la medicinon, vi povos facile detruĝi lin.

—Kiel? —demandis Makamuk. —Lia medicino ne permesos tion.

—Certe, ian parton de sia korpo li ne frotos de la medicino —respondis Yakaga. —Ni detruos lin atakante tiun parton. Eble la orelojn. Nu, ni enpuŝos lancon en unu orelon, ke ĝi reaparu tra la alia. Aŭ eble la okulojn. Sendube la medicino estas tro forta por la okuloj.

La ĉefo kapjesis.

—Vi saĝe parolas, Yakaga. Se li ne posedas alian inferan magiaĵon, ni detruos lin.

Subienkow ne perdis tempon kolektante la ingrediencojn de sia medicino. Li prenis kion ajn li trovis ĉemane: piceajn pinglojn, la internan ŝelon de saliko, pecon de betula ĉelo kaj ankaŭ kvanton da muskoberoj, kiujn la ĉasistoj elfosis el sub la neĝo laŭ liaj instrukcioj. Kelke da frostaj radikoj kompletigis lian provizon, kaj Subienkow revenis kun sia eskorto al la tendaro.

Makamuk kaj Yakaga kaŭriĝis apud li, observante la kvanton kaj la specon de la ingrediencoj, dum li ŝetis ilin en la bol-akvan poton.

—Oni zorgu enĵeti unue la muskoberojn —li klarigis. —Kaj... ha jes! Alia afero! Necesas la fingro de viro. Nu, Yakaga, permesu, ke mi fortranĉu vian fingron.

Sed Yakaga kaŝis la manon sur sian dorson kaj rigardis ĉagrene.

—Nur la etfingron —petis Subienkow.

—Yakaga, donu al li vian fingron —ordonis Makamuk.

—Ĉi tie kuŝas multe da fingroj —gruntis Yakaga, montrante la homajn restojn de la dudeko da personoj torturitaj ĝismorte en la neĝo.

—La fingro devas aparteni al viva homo —objetis la polo.

—Nu, vi havos la fingron de viva viro —respondis Yakaga.

Li alpaŝis al la kozako kaj fortranĉis unu el liaj fingroj.

—Li ne mortis ankoraŭ —li anoncis, ĵetante la sangan trofeon en la neĝon, ĉe la piedoj de la polo. —Krome, ĝi estas bona, granda fingro.

Subienkow metis ĝin en la fajron, sub la poto kaj, rigardante la infuzaĵon, komencis kanti kun granda soleno francan am-kanzonon.

—Sen ĉi vortoj, la medicino ne taŭgas —li klarigis. —La vortoj konsistigas la ĉefan forton de la medicino. Nu, rigardu, ĝi estas jam preta.

—Diru la vortojn iom post iom, ke ni lernu ilin —ordonis Makamuk.

—Nur post ol ni faros la pruvon. Kiam la hakilo resaltos de sur mia kolo tri fojojn, tiam mi diros al vi la sekreton de la vortoj.

—Kaj se la medicino ne estas bona medicino? —demandis Makamuk zorgplena.

Subienkow kolere turnis sin al li.

—Mia medicino ĉiam efikas. Sed, se vi pensas alie, faru al mi kiel al la aliaj. Tranĉu el mi pecon post peco, eĉ kiel oni dispecigis lin —li diris, montrante la kozakon. —La medicino estas jam frida. Jen, mi frotos ĝin sur la kolon, dirante ĉi novan litanion.

Kun granda seriozo li lante kantis versojn de la Marseljezo kaj ĉe la sama tempo ŝmiris sian kolon per la abomeninda infuzaĵo.

Krio interrompis lian aktoradon. La giganta kozako, per la lasta energio de sia mirinda vivo-forto, levis sin sur la genuoj. Ridoj kaj krioj de surprizo kaj aplaŭdo venis de la nulatoj, kiam la granda Ivan komencis skuigi en la neĝo per potencaj spasmoj.

Subienkow sentis kapturton ĉe la spektaklo, sed li regis sian naŭzon kaj ŝajnigis sin furioza.

—Jam sufiĉe! —li diris. —Oni finu lian vivon, kaj tiam ni faros la pruvon.

Vi, Yakaga, zorgu, ke li ĉesu plendi.

Dum oni plenumis lian peton, Subienkow sin turnis al Makamuk.

—Kaj memoru, vi devas forte haki. Ne temas pri infana laboro. Jen, prenu la hakilon kaj frapu la trunkon, ke mi vidu, ke vi frapas kiel viro.

Makamuk obeis, frapante du fojojn precize kaj impete kaj forhakante grandan spliton.

—Bone. —Aprovis Subienkow.

Li ĉirkaŭrigardis la rondon el sovaĝaj vizaĝoj, kiuj iel ŝajnis simbolo de la muro de barbareco sieĝanta lin de kiam la cara polico unuafoje arestis lin en Varsovio.

—Prenu vian hakilon, Makamuk, kaj staru tiel. Mi kuŝigos. Kiam mi levos la manon, haku per via tuta forto. Kaj zorgu, ke neniu staru malantaŭ vi. La medicino estas bona, la hakilo povas resalti de sur mia kolo kaj elskuiĝi el viaj manoj.

Li rigardis al la du sledoj kun la feloj kaj fiŝoj kaj al la jungitaj hundoj. Lia fusilo kuŝis sur la fokaj feloj. La ses ĉasistoj gardontaj lin staris apud la sledoj.

—Kie estas la knabino? —demandis la polo. —Oni konduku ŝin ĉi tien, antaŭ ol ni daŭrigos la pruvon.

Post ol oni tion faris, Subienkow kuŝiĝis en la neĝo kaj metis la kapon sur la trunkon, kiel laca infano preta endormiĝi. Li travivis tiom da teruraj jaroj, ke vere li sentis sin tre laca.

—Mi ridas je via forto, ho Makamuk— li diris. —Haku, kaj haku forte.

Li levis la manon, kaj Makamuk svingis la pezan hakilon uzatan por la ŝtipigo de trunkoj. La ŝtalo brilis tra la frosta aero, haltis dum perceptebla momento super la kapo de Makamuk, descendis kontraŭ la nudan kolon de la

polo, nete hakis tra karno kaj ostoj kaj profunde enpuŝiĝis en la suban trunkon. La mirantaj indianoj vidis la kapon salti unu jardojn for de la sangoŝpruca torso.

Ekregis profunda konsterno kaj silento, sed iom post iom oni komencis kompreni, ke ekzistis nenia medicino. La fel-rabisto superruzis ilin. Nur li, inter la kaptitoj, evitis la torturon. Kaj por atingi tian rezulton li faris sian ludon. Leviĝis longa, brua ridego. Makamuk, plena de honto, klinis la kapon. La fel-rabisto mokis lin. Li perdis la vizaĝon antaŭ sia tuta tribo, kies ridegoj ondadis ankoraŭ. Makamuk sin turnis kaj foriris rapid-paŝe kun klinita kapo. Li sciis, ke, de tiam, oni ĉesus nomi lin Makamuk. Li nomiĝus Perdita Vizaĝo; la memoro pri lia hontigo akompanus lin ĝis lia morto, kaj ĉiuforte kiam la triboj kunvenis en la printempo por komenci la kaptadon de salmoj, aŭ en la somero por komercadi, de buŝo al buŝo kaj de fajro al fajro en la bivakoj cirkulus la historio pri kiel la fel-rabisto mortis sendolore dank' al ununura hako donita de la manoj de Perdita Vizaĝo.

—Kiu estas Perdita Vizaĝo?— li povis anticipi aŭdi la demandon de iu ajn insolenta junulo.


—Ha... Perdita Vizaĝo... —estus la respondo. —Li nomiĝis Makamuk antaŭ ol li forhakis la kapon de la fel-rabisto...

Elangligo de:
FERNANDO DE DIEGO

Glosoj

¹ «Nulatoj»: nomo de la indianoj de la alaska regiono Nulato.

² «Medicino»: uzata en ĉi tiu rakonto en la senco de magia, mirefika rimedo.



ORIGINALA POEZIO

Ekzistas en Esperantujo iu anto kiu pretendas esti poezia ento (?), kaj trude postulas de la kompatinda redaktoro de ĉi revuo, la publikigon de sufiĉe aĉaj poeziaĵoj. Mi pardonpetas al la suferemaj legantoj kiuj devos legi la poeziaj klopodoj de tiu strangulo (kara amiko mia), kiu sin kaŝas sub la nomo "Liven"; sed, kion fari se, kiel li mem diras, li de tempo al tempo poezie blinkembergias sur papero? Ni estu toleremaj. Do, jen kvar el liaj pecoj.

Tra la rando
de la menso,
ŝtelkaŝe
fuĝas penso;
kaj mi,
en ĝia denso.

Vana esper'
pri liber',
kaŝas uter'
patrina.

Sed la sekreto,
post penetro
nur retro,
tra uretro
senfina.

Ĉirkaŭ la tuta ĉio:
vakuo de l' nenio.
Sed ekster tio, kio?

Estas vorto
homforto
el retorto
pensinga.

Estas vorto
mensforto
tra risorto
laringa.

Liven

•	1	2	3	4	5	6	7
1	■						■
2							
3				■			
4			■	■	■		
5				■			
6							
7	■						■

KRUCVORTENIGMO

- Horizontale.* — 1.^a) Jara profito de investita kapitalo.
 2.^a) Homo kiu laboras profesie en kafejo aŭ restoracio.
 3.^a) Sufikso montranta kolektivecon. Loko, en dezerto, kovrita de vegetaĵoj (nuda radiko).
 4.^a) Sufikso signifanta tio, kio servas por efektiviĝi ion. Nomo de la 24-a litero de la E-a alfabeto.
 5.^a) Loka adverbo. Unu el la epokoj de la universo (nuda radiko).
 6.^a) Nomo de monato.
 7.^a) (inverse) Herbo kun floroj farmacie utiligata kiel kontraŭ-tusa drogo.

- Vertikale.* — 1.^a) Kopulacio.
 2.^a) Respondo al tio, kion alia asertis en diskutado.
 3.^a) Ekstere. Malgrande, malintense.
 4.^a) Ripetita konsonanto. Sufikso esprimanta agon aŭ staton ankoraŭ ne komencitan.
 5.^a) Trinkaĵo preparita per infuzado. Sufikso signifanta ke io povas esti farata.
 6.^a) Prezenta la faktojn en emociiga emfaza maniero.
 7.^a) Gaso kun forta oksidiga kapablo, uzata por purigi aeron, sterilizi akvon ktp.

Ciuj, kiuj sendos la ĝustan solvon de la ĉikuna krucvorttenigmo, povos partopreni en la lotado de unu ekzemplero de la kastilingva eldono de la fama verko "Doktor Zamenhof". La limdato por la ricevo de la solvoj: ĝis la 30-a de aŭgusto de 1976.

Ni gratulas la gajninton de la konkursa krucvorttenigmo, starigita en la antaŭa numero (99), s-ro Oscar Puig Cánovas de Sabadell, kiu ricevos la promesitan premion, tio estas la libro "Amuzaj dialogoj en Esperanto".




Himno de l' Eŭropa Junularo

Vortoj kaj muziko de Carl Fohr, trad. de J. F. Berger



1. Po - po - loj eŭ - ro - paj, ni kres - ki de - zi - ras. Ku -
2. So - pi - ras po - po - loj la pa - con, li - be - ron, la -
3. An - taŭ - en, ju - nu - loj, ek - fla - gras la fla - mo Mon -



1. ra - ĝe ni ve - nas kun pu - ra la kor'. La
2. bo - ron ho - min - dan su - fi - ĉa kun pan'. Sen -
3. tran - ta la vo - jon al be - la e - pok'. En



1. pa - con e - ter - nan ni ar - de as - pi - ras. O -
2. i - gi ni vo - las je lar - moj la te - ron. Tro
3. ko - roj sen - nom - braj ek - bru - las la a - mo. Jen



1. fe - roj de vi - vo kaj sang' res - tu for!)
2. mul - tajn eks - ter - mis del' Mort, kru - da man'. } Ni sta - ras ko -
3. pre - taj ni sta - ras por pa - ca al - vok'!



mu - ne en tu - ta la mon - do, A - mi - kon nur vi - das



en la naj - bar', Tam - bu - roj mu - ti - ĝas en ni - a lig -



ron - do, Al al - ta la cel' mar - ŝas ju - na ho - mar'.